WIKIPEDIA

Avesta lingvo

La **avesta lingvo** (ankaŭ konata kiel **zenda** aŭ *zend*) estas orienta irana lingvo, parenca al la malnovpersa, apartenanta al la familio de la hindeŭropaj lingvoj, en kiu estis verkita la Avesto aŭ la sankta libro de la Zaratuŝtrismo. Ĝi estis uzita en la antikva Persio

Avesta lingvo	
Regiono	Orienta Irana Altebenaĵo
Parolantoj	0
Skribo	Avesta alfabeto, gujaratia skribo
Morto	Dato nekonata
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa	
Hindirana	
Irana	
Avesta	
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	ae
ISO 639-2	ave
ISO 639-3	ave
Glottolog	aves1237
Angla nomo	Avestan
Franca nomo	avestique

Ĝeneralaj karakteristikoj

La avestlingvaj vortoj povas aparteni al tri genroj: maskuleno, femineno kaj neŭtro. Koncerne la numero. la vortoj povas aparteni al la singularo, dunombro aŭ pluralo. Ĝi estas sinteza lingvo: la substantivoj estas deklinaciitaj en sep kazoj (nominativo, akuzativo, instrumentalo, dativo, ablativo, lokativo kaj genitivo).

La avesta alfabeto estas evoluo de la malfrua pahlavia skribo, kiu mem devenas de la aramea alfabeto. Ĝia nomo estas *Din Dabiri*. Tiu alfabeto por ĉiuj vokaloj kaj konsonantoj havas apartan klaran literon kaj skribiĝas de dekstre al maldekstre.

Vidu ankaŭ

- Veda Sanskrito

Fonto

En tiu ĉi artikolo estas uzita traduko de teksto el la artikolo Língua avéstica (https://pt.wikipedia.org/w/index.php?title=L%C3%ADngua+av%C3%A9stica&oldid=37055742) en la portugala Vikipedio.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Avesta_lingvo&oldid=6938291"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:33, 13 apr. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.